

# SVISA ESPERANTO - SOCIETO


## INFORMAS

N-ro 4/1993

JULIO-AŬGUSTO

### PAPERAJ PACOBIRDETOJ

(viditaj en Zürich)



Honore al la magia JAPANIO, dum la juniaj muzifestsemajnoj, oni kreis, laŭ la ideo de la desegnisto/grafikisto Ngo Van Da, dek mil paperajn pacobirdetojn kaj pendigis ilin super urba kanalo. Vere impresplena aspekto. -FL-

## GRUPAJ INFORMOJ

Bellinzona:

Ĉiam la unuan sabaton en Viale Motta 32, je la 17.00h.  
Ĉiu estas bonvena.

ESPERANTO-SOCIETO BIEL:

17.30-18.30h Ĉiun vendredon en restoracio Mandarin,  
Dufourstrato 41.

LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:

14.7.14.00-16.00h (merkredo) paroliga kunveno en  
Big Ben, Winkelriedstrasse 39. Guido Franz Brügger.

ATENTU: Gesinjoroj A+K Rey-Zollinger havas novan  
adreson kaj telefonnumeron:

"Stollbergstrasse 32, CH-6003 Luzern. Telefon-nu-  
mero estas 041/22 25 92.

ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:

Ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

ESPERANTOKLUBO WIL:

En Schweizerhof, Bahnhofstrasse 18.

7.7.20.00h KANTADO. Gvidos Verena Chaves-Walder.

1.9.20.00h TEJO-KONGRESO: Raportos partoprenintoj.

ESPERANTO-SOCIETO ZUERICH:

1.7.17.00h Varbostando en Bahnhofstrasse. Infor-  
moj tel 156 54 34.

12.7.09.45h Ekskurso al monto Rigi. Ni renkonti-  
ĝos je la 09.45h sub la granda horloĝo (renkonti-  
ĝa punkto) en la ĉefstacidomo Zürich.

19.8. kaj 26.8.17.00h Varbostando en Bahnhof-  
strasse, (kiel supre).

30.8.19.00h Libera kunveno en kafejo valentino en  
Münstergasse 4.

Bonvolu noti:

La ESZ-prezidanto, s-ro D. Weidmann havas novan  
telefonnumeron: 01/251 50 25.

## ELSENDO PRI ESPERANTO EN LA SVISA TELEVIDO

Merkrede la 21-an de de aprilo 1993/19.00 la Svisa Televido DRS elsendis 10-minutan parton pri vizito en libera kunveno de la Esperanto-Societo Zürich kaj pri la Svisa Esperanto-Kongreso en Luzern, la 13-an kaj 14-an de marto.

La programo estis bona, sed estis domaĝe, ĉar en la mallonga tempo ili ne povis montri ĉiujn surbendigojn faritajn en Zürich kaj Luzern. Tamen, oni certe povas esperi, ke la elsendo instigis multajn ricevi pli da informoj pri la valoro de la lingvo internacia ESPERANTO. -FL-

ooOoo

## NOVA ĈEFDELEGITINO & kotizperantino DE UEA

La estraroj de SES kaj UEA estas decidintaj, ke sinjorino BRUN Sonja, Küntwilerstr. 50, 6343 Rotkreuz, estas la nova ĉefdelegitino kaj kotizperantino de UEA por Svislando. Sia telefonnumero estas 042 64 46 40. Si transprenos tiujn oficojn je la unua de septembro 1993; ĝis tiam funkcias ankoraŭ la malnova delegito WEISS Niklaus.

ooOoo

## M O R T - A N O N C O

La 3-an de majo 1993 mortis, 89-jara, doktorino **TINA PETER-RUETSCHI** el Zürich.

Dum multaj jaroj ŝi estis aktiva membro de la Esperanto-Societo Zürich kaj de la Svisa Esperanto-Societo.

Ŝia plej ampleksa kaj internacia laboro por Esperanto estis sendube la tiel nomitaj

### **KOORDINITAJ ESPERANTOKURSOJ,**

organizitaj dum 10 jaroj. Koordinitaj estis tiuj kursoj, kun samaj tekstoj de doktorino Peter, en popolaltlernejoj de pluraj eŭropaj landoj, kiel:

Aŭstrio, Belgio, Anglujo Danujo, Italio, Nederlando, Svedujo kaj Svislando. La sukceso estis vere rimarkinda.

En la ĝenerala kunveno de la Esperanto-Societo Zürich, de la 13-a de februaro 1989, oni elektis doktorinon Peter **HONORA MEMBRO**. Tiun omaĝon ŝi vere meritis.

Kvankam ŝi kutime laboris malantaŭ la kulisoj, la meritoj por la lingvo internacia Esperanto estis rekonitaj en ĉiu partopreninta lando.

En la Esperanto-Societo Zürich la mortintino restas en bona rememoro. -FL-

ooOoo

## V O K O E L M I Z E R O

El ROSTOV-DON atingis nin voko de patrino kun dujara bebo. En sia letero ŝi priskribas la premigan situacion. Inter alie ŝi diras:

"Mia filineto havas du jarojn kaj mi havas nenion por nutri ĝin. Mi kutimas malsati, sed estas netolereble vidi kiel malsatas bebo.

Mankas ne nur nutraĵo, sed ankaŭ vestoj por mi. Cu vi havus iun ajn eblecon iomete helpi al mi"?

ooOoo

## De Mezepoko al Renesanco en la Lemana baseno




**la 4an kaj 5an de septembro 1993**



Lausanne, Le Cazard, Centre de loisirs et de culture  
Pré-du-Marché 15, 1004 Lausanne  
kaj Abondance (Norda Savojo), Hôtel des Touristes

### PROGRAMO

Sabaton	13:30	Malfermo de la akceptejo en Le Cazard (Lausanne)
	14:30	Inaŭguro
		Iom da Historio - Alain Favre
		Mezepoka arkitekturo en Romandio, Vizito de la Katedralo - Séverine Mussard
	17:30	Ekiro al la haveno, enŝipiĝo en Ouchy
	18:55	Elŝipiĝo kaj enbusiĝo en Évian
	20:00	Vespermanĝo (vidu la menuon dorsflanke)
	21:30	Distra vespero - Andrès Bickel
Dimanĉon	09:30	Iom pli da historio - Alain Favre
		Pentri en la XVa : Toskanio / Savojo. Vizito de la Klostro kaj de ties unikaj pentraĵoj - Pascal Dubourg Glatigny
	12:00	Promenado kaj aĉeto de tipaj produktaĵoj en la bazaro de Abondance. Ebleco de ekskurso kaj pikniko laŭ la vetero aŭ libera manĝado (ne kostas multe en Abondance)
	15:15	Enbusiĝo en Abondance
	16:35	Alveno en Ouchy-Lausanne.



Cazard

Map labels include: ROUTE DE GENÈVE, RUE DE SABBILLON, Ecole des Arts Graphiques E.P.S.I.C. II, PLACE DE LA RIPONNE, Gare Centrale, PLACE DE MILAN, Jardin botanique, Ecole polytechnique, Laboratoire E.P.U.L., Senpaga parkyo, Port marchand, Port, MORGES - NYON - GENÈVE, OUCHY PORT, and various street names like AVENUE DE MILAN, BOULEVARD DE SIMON, and AVENUE DE GRANCY.

A

C

L

E

Map grid numbers: 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 8, 9, 10, 11, 12, 13, 14, 15, 16, 17, 18, 19, 20, 21, 22, 23, 24, 25, 26, 27, 28, 29, 30, 31, 32, 33, 34, 35, 36, 37, 38, 39, 40, 41, 42, 43, 44, 45, 46, 47, 48, 49, 50, 51, 52, 53, 54, 55, 56, 57, 58, 59, 60, 61, 62, 63, 64, 65, 66, 67, 68, 69, 70, 71, 72, 73, 74, 75, 76, 77, 78, 79, 80, 81, 82, 83, 84, 85, 86, 87, 88, 89, 90, 91, 92, 93, 94, 95, 96, 97, 98, 99, 100.

## PRELEGOS

- Séverine MUSSARD**, arthistoriistino, Universitato Paris X.
- Pascal DUBOURG GLATIGNY**, arthistoriisto, Universitato Paris X.
- Alain FAVRE**, instruisto, kunverkis historian libron pri Savojo, Vicprezidanto de Kultura Centro Esperantista.

## DISTRA VESPERO

Andrès BICKEL proponas al vi variajn ludojn amuzajn kaj paroligajn, en kiuj ĉiuj povas ludi samtempe, ĉu kune, teame aŭ pare. La ludoj strebas disvolvi interkonadon, fantazion, refleksojn kaj vortriĉecon.

 Posta dancado eblas 

## MENUO

Savoja Specialaĵo	aŭ	supo
Berthoud (fandita fromaĝo)		unua plado
terpomoj, ŝinkaĵo		garnita viando
deserto : norvega omleto		fromaĝo, deserto

**KIEL PARKI EN LAUSANNE ?** parkejo senpaga ekzistas en Ouchy, borde de la lago, oriente de la haveno.

Per la buso n° 2 ĝis la haltejo - RIPONNE - vi povas atingi le Cazard.

**EI LA STACIDOMO** uzu la buson n° 5 ĝis - RIPONNE -

## AVERTO

Dum tiu semajnfino ni bedaŭrinde ne povos organizi lingvajn kursojn. Tamen la prelegantoj pretas resumi kaj respondi demandojn en ĉiuj oficialaj lingvoj de Svislando kaj en la angla.

🌊 ALIĜILO 🌊

FAMILIA kaj persona nomoj : \_\_\_\_\_

ADRESO : \_\_\_\_\_

KOTIZOJ :	PREZOJ	MENDOJ
du aŭ tri lita ĉambro sen duŝo :	CHF 134.-	_____
unulita ĉambro sen duŝo :	CHF 141.-	_____
dulita ĉambro kun duŝo :	CHF 153.-	_____
unulita ĉambro kun duŝo :	CHF 164.-	_____

La kotizoj entenas : prelegojn, vojaĝkostojn, enirbiletojn, vespermanĝon (sen trinkaĵoj) kaj unu tranokton.

DATO : \_\_\_\_\_

SUBSKRIBO : \_\_\_\_\_



**ORGANIZANTOJ :**

Alain FAVRE, pl. de la Mairie, F-74140 DOUVAINE ( ☎ 00.33 / 94.02.08 )  
Nicole MARGOT, ch. des Lys 4, CH-1010 LAUSANNE ( ☎ 021 / 653.14.67 )

✂️ **Aliĝo resendota al**  
**Nicole MARGOT, ch. des Lys 4, CH-1010 LAUSANNE**  
**CCP 10-77957-3**

Via aliĝo validos post la konfirma pago de la kotizo.  
Abundance estas tre ŝatata kaj vizitata loko, do necesas aliĝi jam nun !



# POLSKIE RADIO WARSZAWA

---

30.01.1993

## PAROLAS VARSOVIO...

Pola Radio aŭdigas siajn Esperanto-elsendojn ĉiutage de la 4-a de aprilo 1959. Nuntempe oni disaŭdigas du elsendojn:

15.30 h. - 31,50 m, 41,99 m, 49,22 m, 200 m  
/ = 9525, 7145, 6095, 1503 kHz/

22.30 h. - 41,18 m, 41,27 m, 49,22 m, 200 m  
/ = 7285, 7270, 6095, 1503 kHz/

Atenton! La horoj estas indikitaj laŭ la nuna mezoŭropa tempo!

En la elsendo je la 15.30 h. oni aŭdigas ĉiutage, escepte de dimanĉoj, novaĵojn kaj trarigadon de la varsovia gazetaro, krome polajn kaj E-movadajn temojn, dimanĉe ni reaŭdigas samhore la leterkeston.

En la elsendo je la 22.30 h. post la aktuala komentario oni povas trovi la jenajn programerojn:

lunde - koncerto kun bondeziroj;

marde - trarigardo de E-revuoj kaj bultenoj;

merkrede - familia magazino "Pollando hodiaŭ";

ĵaŭde - kultur-magazino;

vendrede - "Homoj kaj problemoj" - ĉefe E-movadaj interparoloj, sonraportoj, diskutoj ktp.;

sabate - leterkesto, iafoje kun la pertelefonaj intervjuoj kun aŭskultantoj;

dimanĉe - "Esperanto-ekspreso" - raporto pri E-movadaj okazaĵoj, intervjuoj kun E-agantoj, E-sonraporto ka.

Bonvolu informi pri la E-elsendoj de Pola Radio viajn geamikojn, samklubanojn, vian lokan E-bultenon ktp. Pli da programinformiloj vi povas ricevi ĉe: Pola Radio, Esperanto-Redakcio, 00-950 VARSOVIO, Box-46, Pollando.

### KARAJ LEGANTOJ,

De la Malta Esperanto-Societo mi ricevis la Bultenon MEZMARA STELO. En ĝi estis interesa artikolo pri la vojaĝo de la evangelisto Paŭlo, en la jaro 60 post nia tempokalkulo. Ĝi temas pri la insulo Malta. Mi permesas al mi prezenti ĝin al la legantoj de SES INFORMAS.

-FL-



### NIA PATRO SANKTA PAŬLO

Ĉiujare je la 10-a de februaro ni Maltanoj memorigas la ŝippereon de Sankta Paŭlo sur Malto.

La ŝippereo okazis en la jaro 60 p.K., sur la rokoj de la bordo, hodiaŭ nomata por la Sanktulo, alpuŝigita de la nordorienta vento, hodiaŭ nomata "Gregale" aŭ greka vento. La rakonton de ĉi tiu por ni glora episodio oni povas legi en la Aĝoj de la Apostoloj: ĉapitro 27-28. Pri la ŝipperea loko memorigas statuon de la granda Apostolo.

Sankta Paŭlo restis tri monatojn ĉi tie, kaj laŭ la Aĝoj, li estis akompanata de Sankta Luko. Estas menciinde, ke ĉiufoje, se ni Maltanoj ekparolas la nomon Sankta Paŭlo, ni ĉiam aldonas la vortojn "Nia Patro", ĉar li ja estis tiu, kiu konvertis la tiutempajn insulanojn al la Kredo de Kristo, kiu Kredo restas ĝis nun, post dumil jaroj, la Kredo de Maltanoj. Troviĝas en Malto multaj preĝejoj dediĉitaj al ĉi tiu granda Sanktulo. Jen la komenco de ĉapitro 28 de la Aĝoj: "Kaj kiam ni saviĝis, tiam ni sciiĝis ke la insulo estis nomata Melita. Kaj la barbaroj montris al ni neordinaran bonecon; ĉar ili ekbruligis fajron kaj akceptis nin ĉiujn pro la tiama pluvo kaj pro la malvarmeco".



AZB 8053 Zürich
PP/Journal 8053 Zürich

IMPRESSUM

Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft  
 Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich  
 Herstellungsort: Copy Quick Zürich. 6x im Jahr  
 Red. Telefon 01/381 77 13

A N O N C E T O J

**la plej** vaste legata junulara gazeto  
 rekomendinda por komencantoj  
 bela kaj moderna  
 diversa kaj amuza  
 interesa por ĉiuj

Abonu ĉe via  
 UEA-kotizperanto aŭ  
 petu provekzempleron  
 kontraŭ unu internacia  
 respondkupono ĉe TEJO,  
 Nieuwe Binnenweg 176,  
 NL-3015 BJ Rotterdam,  
 Nederlando.



Por Esperantistoj senpage luebla ĝardeno (dekliva)  
 kun ĝardendomo (kabano) 9m<sup>2</sup>; Po tagoj, maks. unu  
 monaton. Enestas trietaĝa kajutlito, elektra for-  
 no-disko kaj aliaj utilaĵoj.  
 Hans Kästli, Esperantotendumejo  
 Sunhejmo  
 CH-9424 Rheineck (Telefono: 071/44 12 20)

REDAKTIFFINO de "SI" 5/93 estas la 14-a de aŭgusto 1993.